ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado

Petoj kaj Proponoj

Komercaj reklamoj

TRA LA FILATELIO

Rejna Esperanto-Kolonio
BAD-GODESBERG
Bad-Godesberg a. Rh. (Germanujo).

AL LA KOLEKTISTOJ

TOBLER'A
bonega Svisa Lakta Ĉokolado
ESPERO
Kun Esperanto-Jurnalo ilustrita
ĈIE AĈETEBLA

Grandaj Vinoj el Burgonjo
MOREAU-VOILLOT
BEAUNE (Côte-d'Or-Francujo)

Ĉasopis Českých Esperantistů

Germana Esperanto-Librejo
LEIPZIG

Internacia Traduka Oficejo

JUVELEJO CARNAVALET
M. DUFAUX, 30, rue de Sévigné
PARIS — Métro St-Paul

Heilanstalt-Kuracejo
BERLIN NW. 6

"NOVAĴO"
PATENTSPRONO KUN FLEKSEBLA KOLO

Grand Marko "Ville de Paris"
INKOJ MIETTE
Jules MIETTE
102, Rue Amelot, PARIS-XI

Por la Higieno de l'tualeto
COALTAR SAPONINE LEBEUF
BAYONNE (Francujo)

PRESEJAJ LITEROJ MAYEUR
ALLAINGUILLAUME, J. SALING & C^ie^
PARIS
21, RUE DU MONTPARNASSE

J. & J. COLMAN
(Akcia Societo)
MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO kaj BRITA RIZFARUNO
108, CANNON STREET, LONDON

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

aŭ ESPERANTIO

Fondita la 28an de Aprilo 1908

KOMITATO DE U. E. A.

D^ro^ L. L. ZAMENHOF, Honora Prezidanto.
H. BOLINGBROKE MUDIE, Prezidanto, London.
H. HODLER, Vicprezidanto (Administrado), Genève.
Th. ROUSSEAU (Financoj), Genève.
A. CARLES (Konsuloj), Béziers.
P. BLAISE (Esperanto-Oficejoj), London.
J. SCHMID (Turismo), Bern.
D^ro^ M. KANDT (Komerco & Industrio), Bromberg.
F. ROCKMANN (Junuloj), Magdeburg.
Sidejo: 8, rue Bovy Lysberg, Genève (Svisujo).

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

Le gérant : DUVAL
Laborista Kooperativa Presejo, 15, rue Amiral-Roussin, Dijon (Francujo)

V^a^ jaro. — N° 63 Unu numero : 6 SPESDEKOJ (15 centimoj) 5 Oktobro 1909

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Duonmonata Internacia Gazeto

Direktoro : HECTOR HODLER

ABONO

Jara Abono . . . . 1,60 $ (4 frankoj)

La abonoj komenciĝas de la 1^a^ de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agentoj.

Redaktejo & Administrejo : 8, rue Bovy-Lysberg, GENÈVE (Svisujo).

REKLAMO

Ĝeneralaj Agentoj : Esperanto, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo); G. Wakker, 15, rue Montmartre, Paris; C.-A.-G. Browne, 20, Wellington St., Strand, London W.-C.; Germana Esp. Librejo, Rathausstr, 52, Leipzig.
Vidu la tarifon sur la 4^a^ paĝo

LINGVO VIVANTA

Ni ĉi tie donas resumon de la elokventa parolado, kiun faris S^ro^ Ed. Privat ĉe la kunveno de la Instituto de Esperanto en Barcelono. Ni ne bezonas rimarkigi ke la ideoj ĉi tie esprimitaj tute respondas al la idealo de Esperantio kaj pruvas ĝian necesecon.

Oni ofte diris, ne nia lingvo estas artefarita kaj seka fabrikaĵo, ke vivi ĝi ne povos, ĉar literaturon ĝi neniam povos havi. Oni pretendis instrui nin, ke lingvo povas vere vivi, nur se ĝi havas popolon por ĝin paroli, popolon por ĝin kanti kun amo kaj poezio.

Jes, efektive, estas plej konata fakto, ke ĉiu vivanta lingvo havas propran spiriton. Ĝi reprezentas la sentojn kaj ideojn de la popolo kiu ĝin parolas. Jes, efektive, lingvo povas vivi nur per tiu propra spirito, kiu kreas ĝian literaturon.

Pro tio, se D^ro^ Zamenhof estus nur lingvisto, li estus kredeble kreinta vere artefaritan lingvon, kiu restus eble senviva teoria projekto, kiel tiom da aliaj. Sed tion ni ĉiuj scias, ke antaŭ ol esti lingvisto kaj vere antaŭ ĉio, nia Majstro estas *homo*. (Apl.)

En nian lingvon li jam de la komenco enblovis *homan* spiriton. En ĝi li verkis *homajn* poemojn.

Kun ĝi li ligis grandan ideon kaj noblan senton. Tiel, kune kun la lingvo, li fondis popolon kaj, laŭ sia propra konfeso, la lingvon li fondis nur *pro* kaj *por* tiu nova popolo. Kaj tiu popolo nun vivas kaj kreskas ĉiujare. Ĝi estas ni, esperantistoj ĉiulandaj, kiuj amas Esperanton, ĉar ĝi simbolas nian internan ideon kaj celon. (Apl.)

Kiu studis la historion de la lingvoj, tiu scias, ke vivas kaj evolucias la lingvoj nur dank'al *sentaj* movadoj, neniam dank'al decidoj de lingvistoj. Ĉiu scias, kiel la potenca movado komencita de Luther en Germanujo progresigis la germanan lingvon, dum samtempe ĝi tranformis muzikarton kaj kantadon. Kiu konas la historion de la franca lingvo, tiu bone scias kiel, ĉe la fino de l'antaŭlasta centjaro, Chateaubriand, per enkonduko de « nova sento » en la literaturon komencis la grandan sentimentalan movadon, kiu tiel riĉigis la francan lingvon kaj baldaŭ donis al ĝi Victor Hugo kaj lian skolon.

Nu, ĉu la unua verso de nia amata himno ne estas : « En la mondon venis nova sento... » ?

Jes, tiu « nova sento » estas la kaŭzo kial nia lingvo allogis tiel fervoran armeon de adeptoj. Tiu « nova sento » donas al la esperantista popolo ĝian entuziasmon, ĝiajn kantojn, ĝian poezion, ĝiajn simbolojn, ĝian literaturon, unuvorte ĉion, kio faras la vivon de iu nacia lingvo. (Apl.). Same kiel patriotismo kreskigas — kaj eĉ kelkfoje revivigas — naciajn lingvojn, same nia esperantismo, kiun simbolas la verdstela flago, kreskigas kaj vivigas nian karan lingvon.

Sed dum ofte la nacia patriotismo devigas homojn malami aliajn naciojn kaj aliajn lingvojn, nia internacia kaj pura esperantismo nur igas nin ami ĉiujn popolojn kaj iliajn lingvojn. (Apl.).

Tiel ĉiu homo povas — kaj ĉiu ja devus — ami samtempe sian nacian lingvon por sia kara patrujo kaj Esperanton por la tuta homaro.

Tiuj ideoj kaj sentoj ja kreis nian ankoraŭ malgrandan literaturon kaj, de dudek jaroj, sur la lipoj kaj sub la plumo de l'esperantistoj, nia lingvo viviĝis kaj kreskis ĉiutage pli kaj pli. Ĝi nun estas vere vivanta lingvo, kiu komencis saman naturan evolucion kiel la aliaj lingvoj kaj kiun de nun neniu en la mondo povas arbitre tuŝi. (Apl.).

Nun, ke tiun rezultaton ni ŝuldas sole kaj entute al la interna ideo kaj spirito de Esperanto, tion ĉiam memoru bone ĉiuj, kiuj lernas nian lingvon, eĉ se ili ne komprenas aŭ ne akceptas tiun senton de l'esperantismo.

Laŭ nure lingvoscienca vidpunkto ni devas konstati ke la interna ideo de Esperantismo estis la ĉefa kaŭzo de la viviĝo de nia lingvo. (Apl.).

Oni devas gratuli la organizintojn de la Floraj Ludoj, ke ili ĉe tiu kongreso donis novan kuraĝigon al esperanta verkado, kiu esperele ĉiam pli kaj pli riĉigos nian lingvon per bela kaj forta *originala literaturo*. Ankaŭ oni devas danki al tiu admirinda organizaĵo U. E. A., kiun D^ro^ Zamenhof nomis « la vera realigo de esperantismo », kaj kiu fariĝis la plej firma garantio kontraŭ ĉiuj atakoj al nia lingvo. (Apl.).

Nia lingvo estas sur plej bona vojo. Ni povas iri antaŭen kun plej plena fido kaj renovigita kuraĝo, ĉar en niaj koroj kuŝas nun definitiva certeco pri la vivo de Esperanto.

Vivos Esperanto por la bono de l'homaro. (Longa apl.).

SOCIA VIVO

JURO

La Kvarspesdeka poŝto. Ĉu ni ĝin havos iam?

En la Brita parlamento la 7^an^ de la kuranta monato, S-ro Morton demandis al la ministro, ĉu li intencas aranĝi por ke oni povu sendi leterojn po 4 Sd. al Turkujo, kaj ankaŭ ĉu ekzistas britaj poŝtoficejoj en Konstantinoplo kaj en Ŝanghajo (Ĥinujo). Kaj ĉu oni ordinare sendas leterojn po 4 Sd. al Ŝanghajo kaj aliaj lokoj en Ĥinujo. La ministro respondis, ke jam ekzistas agentejoj de la brita poŝtoficejo en Ŝanghajo. La kvarspesdeka leterpoŝto troviĝas en la lasta nomata loko kaj en ĉiuj aliaj urboj en Ĥinujo, kie jam estas Hong-Kong'a agentejoj. Li aldonis, ke li ne meditas aranĝojn por kvarspesdeka poŝto inter Britujo kaj Japanujo.

Respondante al aliaj demandoj la ministro diris, ke li opinias, ke la kvarspesdeka tarifo plimalpli baldaŭ internaciiĝos, sed se Britujo starigus la aferon inter Britujo kaj Turkujo, ĉiuj landoj fremdaj atendos la saman kaj tio kostus ĉirkaŭ 3,505.000 $ jare.

GEOGRAFIO

Usono honorigos la kreinton de la vaporŝipo. Al la gloro de Fulton. La vivo de inventisto.

En Usono oni baldaŭ honorigos la kreinton de la vaporŝipo kaj festos la centan datrevenon de tiu inventaĵo. Antaŭ cent du jaroj — la 17 Aŭgusto 1807 — la unua vaporŝipo foriris el New-York laŭ la rivero Hudson. Ĝi vespere alvenis en Clermont, vojaĝinte 103 mejlojn; poste ĝi iris ĝis Albany (150 mejloj); la trian tagon ĝi revenis al New-York. Entute ĝi uzis 32 horojn por iro kaj 30 por reveno. Tiun vojaĝon, per kiu estis inaŭgurita la unua publika navigada servo, Usono rememorigas samtempe kun la tricenta datreveno de la eltrovo de la golfo de New-York.

Instrua kaj nobla estas la vivo de Fulton. El tre malriĉa familio Fulton ricevis tre neplenan instruitecon. Post la morto de l'patro li devis juna labori por helpi al sia patrino kaj ŝiaj infanoj. La vesperojn li dediĉis al meminstruado, speciale de la sciencoj, kiuj lin allogis. Oficisto ĉe juvelisto li tie lernis desegnarton kaj elementojn de mekaniko; poste li fabrikis diversajn ilojn, kiujn li mem vendis sur la stratoj. Dank'al tiu komerco li povis aĉeti bieneton por sia patrino. La junulo tiam foriris al Londono kaj, dudekjara, sin okupis pri pentrado, sed mallonga estis lia artisto kariero. Fulton revenis al mekaniko; li elpensis ŝpinilon, studis plibonigon de la mueliloj kaj de kanaloj en Anglujo, sed ĉi tio ne liveris brilajn rezultatojn.

Je la trideka jaro Fulton venis Parizon, estis prezentita al ministro Carnot, kiu ne ŝatis liajn ideojn pri libereco de komerco. Li proponis al la registaro submaran ŝipon, kies projekton studis Komisio. Ĝi tiel longe studis ĝin, ke Fulton neniam konis la rezultaton de ĝia ekzamenado. La inventisto sin tiam turnis al Bonaparte, kiun interesis lia projekto. Unua eksperimento de Havre ĝis Brest malsukcesis; dua submara ŝipo liveris pli bonajn rezultatojn. Fulton proponis al Napoleono, militanta kontraŭ Anglujo, la kreon de submara ŝiparo. Ŝajnas, ke tiu propono estis tro malfrue komunikita al la imperiestro. En Anglujo oni atente konsideradis liajn eksperimentojn kaj proponis, ke li alportu siajn planojn Londonon. Li rifuzis; dume li eksperimentis vaporŝipon sur rivero Seine. Post kelkaj provoj li sukcesis naĝigi sian ŝipon sen remilo kaj sen velo. Tamen, kontraŭbatalita de la oficialaj sciencistoj, Fulton, kiu ricevis monhelpojn de Francujo, ĉesis ilin havi, ĉar oni konsideris, ke tro da mono estis elspezita senecele.

La inventisto iris Anglujon, kie oni proponis al li jaran renton interŝanĝe de liaj planoj. Li ne akceptis pro timo al ekspluatado kaj do revenis Amerikon, tiel malriĉa kiel ĉe la foriro.

Ankaŭ tie rekomencis la vanaj klopodoj. Oni lin ne aŭskultis aŭ ridis pri li. Sed iu lin aŭskultis kaj kredis, S-ro Livingstone pagis la konstruon de *Clermont*, la unua vaporŝipo, kiu iris de New-York al Albany. Sur la bordoj de Hudson la popolamaso, alkurinta, ridis kaj mokis pri tiu ŝipo, kiu celis naĝi alie ol la aliaj. Laŭ ĝi Fulton estis frenezulo. Sed tuj haltis la ridoj kaj ilin anstataŭis profunda emocio : la ŝipo naĝis, sen remilo kaj sen velo! Kaj el ĉiuj brustoj laŭtiĝis grandegaj aklamoj; Fulton ploris...

La ŝipo ja ne ankoraŭ similis niajn nunajn vaporŝipojn. Ĝi estis tre primitiva; tamen oni rapide konfidis al ĝi kaj prezentiĝis multaj pasaĝeroj. La *Clermont* estis longa 50 metrojn kaj larĝa 6; ĝin movis vapormaŝino de 26 ĉevalfortoj.

Antaŭ Fulton oni elpensis movigi la ŝipojn per movilo pli taŭga ol la remiloj kaj diversaj provoj estis faritaj. Sed al Fulton apartenas la gloro, ke li kreis la unuan vaporŝipon kun pasaĝeroj kaj ankaŭ la unuan militan vaporŝipon. Per lia verko definitive kreiĝis la vapornavigado. Malgraŭ tio Fulton devis suferi ĉiujn malĝojojn de la inventistoj. Oni lin kalumniis, kopiis, ĉiel kontraŭstaris. La bataloj, kiujn li devis fari kontraŭ fervoraj malamikoj, mallongigis lian vivon. Li mortis la 24. februaro 1815, apenaŭ kvindekjara. Tiu tago estis la komenco de lia senmorta triumfo kaj gloro.

L. J.

Amura entrepreno. — La oro delogas

En Orienta Siberio la rusa registaro organizis grandiozan entreprenon, konstruon de granda, kara fervojo trans montara lando, Amura Ĉemora. Certe tiu ĉi afero kostos grandan sumon. Tamen tiu ĉi ne estos grava. Rusujo jam konstruis grandan siberian vojon. Tiu-ĉi entrepreno estas interesa tial, ke la fervojo iros trans lokoj, kiuj estas riĉegaj de oro, arĝento, kaj aliaj mineraloj.

Jen kion rakontas kelkaj personoj, kiuj veturas de loko de konstruo al okcidenta kvartalo de Amura fervojo. La regiono en kiu estos konstruata la fervojo estas senviva. Ĝis nuna tempo tiun teron preskaŭ ne tuŝetis la piedo de l'homo. La tiea tero ne estas taŭga por terkulturo, kaj anstataŭe, ĝi estas kolose riĉa de oro. Oro, kiel rakontas orfosistoj, estas abundega. Sufiĉas demeti supran tavolaĵon, kaj montriĝos grandaj pecoj de oro. Nune, kiam, dank al laboroj por la fervojo, eltroviĝas la aliro en senvivan, sovaĝan tajgon, multaj sekretfosistoj kuniros.

La « Ora febro » malsanigis eĉ fervojajn laboristojn; je la granda malplezuro de siaj estroj ili forjetas sian laborojn kaj iras fosi oron. Tiuj laboristoj, kiuj ne decidas forjeti sian laboron, trovas oron en lokon de laboroj dum laboro. Tiam ili forlasas la laboron kaj komencas drinki ĝis kiam ili drinkis la akiraĵon. Unu grupo de laboristoj dum semajno elfosis da oro unu milon da spesmiloj. Tiaj okazoj ne estaj maloftaj. La drinkado kreskis terure. La vendistoj nun portas multajn drinkaĵojn trans rivero Amuro el urbo Blagoveŝĉenka kaj de alia ĥina bordo. Oni vendas botelon po unu $. Certe tiu-ĉi prezo estas malgrandega dum facila akiro de oro. Se oni ne malaperigas la drinkvendistojn, labori por fervojo estos malfacilege.

La naturaj laboroj ankaŭ estas malfacilaj. La marĉoj estas tre vastaj. En kelkaj lokoj estas renkontita ĉiama frostiĝintaĵo, kiu iras en grandan profundaĵon. En kelkaj lokoj malfermiĝas potenca skala tavolo. Arboroj estas densaj, tamen por la konstruo arbaro ne estas sufiĉe bona. Lignon oni devas alveturigi. La vojoj kaj ŝoseo ne estas pretaj kaj alveturigo de produktaĵoj kaj konstruaj materialoj estas farataj per ĉevala rimedo, kaj sur vaporŝipo, kiam tio estas ebla.

A. Borisov (Ĥarbin).

La Turismo en Japanujo. Kio estas « Bonakcepto ».

En la interesa revuo de la Franca Turing-Klubo, S-ro Rondet-Saint ekzamenas la gravajn progresojn, kiujn faris la Japanoj rilate al turismo. La Japanoj ne nur larĝe malfermis sian landon al la fremduloj, sed nun celas altiri al ĝi kiel eble plej multe da eksterlandaj vizitantoj. Ili komprenis la gravan profiton, materialan kaj moralan, kiun al ili povas alporti la kreo de vasta turista movado, kaj kiel necesa estas la diskonigo de sia patrujo eksterlande. Nuntempe, la turisto povas libere kaj agrable travojaĝi Japanujon. Ĉie li estos ĝentile akceptata kaj gastigata. Por trafi tiun rezultaton, la iniciatantoj uzis la metodon sekvitan de la Japanaj Stathomoj en aliaj rilatoj, t. e., ili studis, kio okazis en aliaj landoj kaj ĝin adaptis al sia propra patrujo. Ili komence fondis sub titolo « Bonakcepto » societon, kies sidejo estas en Tokio kaj eklaboris. Ili por la fremduloj eldonis libretojn, plejparte anglolingvajn, kiuj : pro la praktikeco, klareco kaj beleco, estas vere imitindaj. La societo celas « bonakcepti la fremdulojn, kiuj vizitas Japanujon kaj helpi ilin dum ilia restado; kaj — rimarkinde — malaperigi la rasajn antaŭjuĝojn kaj forigi la barojn, kiuj apartigas Orienton el Okcidento. Ĝi ricevis apagon de la imperiestra familio kaj gravan monhelpon. La turistoj povas aliĝi po 3 $. Inter aliaj servoj, ĝi estas al la dispono de la turistoj pri la vizitado kaj studado de la lando, faciligas la vidadon de la artaj verkoj kaj ilin rilatigas sociale kaj komerce kun la enlandanoj.

La praktika agado de la « Bonakcepto » elmontriĝis en lerta maniero : ĉiu membro ricevas karton kaj bonegan gvidlibron, kiu enhavas liston de hoteloj, planoj de ekskursoj, konsilojn pri vojaĝokostoj, doganoj, monoj, restoracioj, k. t. p. Ĉio estas konciza, klara, praktika. La deziro eviti al la vojaĝanto embarasojn en lando kie ĉio estas speciala, precipe la lingvo, montriĝas ĉie. Se vi alvenas en grandan havenurbon, afiŝo proponas al vi la helpon de la societo. En grava poŝtoficejo, vi trovos skribaĵon pri la kurieroj, formalaĵoj, eraroj evitotaj. Sur la stacidomaj kajoj gravaj tabeloj citas la vidindaĵojn, kuriozaĵojn kaj transportilojn. Fine, sub la aŭspicioj de la societo, ekzistas aparta organizaĵo vere utila. En la ĉefaj urboj estas interpretoj-gvidistoj rajtigitaj de la registaro. Ilian salajron fiksas speciala regularo. La « Bonakcepto » havigas tiujn gvidistojn kaj prizorgas la plendojn pri ili. Krom ili, multaj studentoj sin proponas por tiu ofico. Ili tiel havas la eblecon praktiki la fremdojn lingvojn kaj plilarĝigi sian scion. Se ilia sperto pri vojaĝo estas malpli granda, ilia helpo, en rilato intelekta, estas tre supera. Tiuj junuloj per tio trovas atentindajn rimedojn kaj komencon de socialaj rilatoj profitigaj. La sinjoroj povas same helpigi al si per japaninoj, profesiaj gvidistinoj parolantaj angle. Junulinoj de superaj lernejoj ankaŭ akceptas tiun taskon.

Per tiu skizo oni vidas, ke atentinda kaj en multaj rilatoj imitinda estas la organizo de turismo en la lando de l'leviĝanta suno. Ni esperu, ke kiam la Esperantistoj Kongresos en Tokio, ili trovos similan organizon, kiu uzos Esperanton por helpi al la vizitantoj.

Superakvego en Manĝurio

En la fino de la nuna somero rivero Sunguri en Manĝurio tiel grande disverŝis, ke multaj vilaĝoj fariĝis sub akvo. La bordoj de la rivero demoviĝis je 10-15 kilometroj. En la rivero naĝas fojnamasoj, objektoj de dometoj, el kies fenestroj aŭ tegmento ĥinoj kaptas fiŝojn. Tiu ĉi superakvego alportis grandan malriĉecon. Al guberniestro de Girinu'a provinco estas prezentita raporto, en kiu oni diras, ke pro la superakvego 10.000 homoj perdis sian tutan mastrumaĵon. Estas granda bezono helpi al ili per mondonacado. Oni rekomendis, ke la riĉaj personoj helpu per donacado de objektoj aŭ naturaĵoj; se tia helpo ne estas alportita, multaj el la malriĉuloj fariĝos hunhuzoj (ĥinaj rabistoj), kiuj jam sen tio estas multaj. En urbo Girin estas organizata monkolekto, kiu donis 556 $. Urbon Ĥarbin rivero Sungari ankaŭ minacis. Tamen la akvo ne povis eniri en komercan parton de urbo Ĥarbin, sed ĝi verŝiĝis sur duan bordon, kie staras restoracioj. Nune la akvo komencis plimalgrandiĝi.

A. B. (Ĥarbin).

Pri la migradflugado de la birdoj

Pro la granda scienca signifo kiun la birdejo de la Germana Ornitologia Societo en Rossitten (Kur. Nehr.) posedas en naturscienca rondo, mi volus atentigi je tiu ĉi loko pri la ringprovoj de la dirita institucio, ĉar la afero estas tute internacia. La direktoro de la birdejo S^ro^ D^r^ Thienemann sur la kura terŝolo en Germanujo eldonis ĉiujare ringojn en la Nejmaj provincoj por migradbiroloj : Kornikoj, mevoj, sovaĝanasoj kaj nome cikonioj. Tiu ĉi ringojn kiuj portas la suskribon « Vogelwarte Rossitten Kur. Nehr. Germania » kaj la eldonan numeron estas metataj ĉirkaŭ la piedojn de la birdoj. Se la birdo forflugas suden en aŭtuno en pli varmajn landoj kaj tie estas kaptita oni resendas la nomatan ringon al la ĝusta adreso en Rossitten. Multnombraj rezultatoj montras ke tiuj ĉi ringprovoj, enkondukataj de D^r^ Thienemann, estas eksterordinare valoraj por la scienco de la birdflugado el nordaj landojn suden. En tiu ĉi jaro jam kvin rinkcikonioj estas anoncataj el la sudafrika vintrorestado nome el la Kalahavi dezerto, kaptitaj de Hottentotoj kaj en la Basutolando. La lasta birdo, kiu estas 9-monata traflugis malproksiman vojon de 9,560 kilometroj — tre respektinda efiko — kaj la rijata ringo revenis en la hejman lokon Rossitten. La sudafrikaj gazetoj : « The Iape Daily Telegraph », Port Elizabeth kaj « The Star » en Johannesburg (Transvaalo) raportis pli ofte pri la rezultatoj de la ringcikonioj. Ankaŭ tiu ĉi artikolo atentigas ke ĉiu trovata ringo de la kaptita birdo kiu portas la enskribon : « Vogelwarte Rossitted Kur. Nehr. Germania » estu resendata al sia adreso.

J. Schwaiger (Del. Kœnigsberg).

IDEOJ & FAKTOJ

La Vivo en New-York dum aŭgusto

La Aŭgusta monato estas tie ĉi ĝenerale la plej maldankema de vidpunkto jurnalista. Inter la aliaj monatoj de jaro ĝi estas la sama kio la tria horo nokte estas por la butikistoj. La leĝfabrikoj, tiel de la nacio kiel de la ŝtatoj, estas fermitaj; la juĝejoj estas fermitaj; la universitatoj kaj la malaltaj lernejoj estas fermitaj; la teatroj kaj la operoj estas fermitaj; kaj eĉ la preĝejoj — almenaŭ de la riĉaj kongregacioj — estas fermitaj. Ĉiuj bonhavantoj forlasas la urbon — aŭ por siaj somerdomoj aŭ por Eŭropo. La aferoj de la pli gravaj establoj estas traktataj de subuloj. Mallonge, ĉiu, kiu estas de ia graveco je la fako de socia aktiveco estas for de la urbo, kaj la ĉiam fidela mara serpento — Dio benu kaj plimultigu ĝin — estas la sola savanto de la malĝojaj jurnalistoj. Sed, tiun ĉi monaton, — almenaŭ je la fino — du gravaj okazintaĵoj — venis al la helpo de niaj malesperintaj jurnalistoj.

La plej grava el ili estas la reveno hejmen el Eŭropo de la fama kaj la plej sukcesa fervoj entreprenisto de Usono, S-ro E.-H. Harriman, en malbona fizika stato. La akcioj de ĉiuj fervojoj sub lia direktado, kiuj estas multaj kaj vastaj, multe malaltiĝis, kaj pro simpatio, ĉiuj aliaj akcioj falis kune kun ili. Tia efekto sur la borso pro la malsaniĝo de unu persono ne estis ebla antaŭ kelkaj jaroj, kiam ĉiu el la multaj fervojoj estis direktata aparte. Sed nune, kiam nia tuta vasta fervojaro estas en malmultaj manoj, la fizika stato de iu el ili — precipe se tia persono estas homo agema kaj originala, — estas efektive okazo de grava komuna intereso.

La dua — grava sociala okazintaĵo — kiu okupas multe da spaco en la gazetoj, estas la malfermo, la unuan fojon post 15 jaroj, de la fama Marble House (la Marmora Domo) de la vidvino S-ro O.-H.-P. Belmont, la patrino de la dukino Marlborough, por la propagando de « voĉdonoj por virinoj ».

Tiu ĉi belega domo, la plej belega de sia speco en Usono, estis konstruata de ŝia unua edzo, S-ro W.-K. Wanderbilt, unu el la plej riĉegaj « Fervojo-Magnatoj » kiel ilia somera loĝejo, je la kosto de pli ol miliono da dolaroj. Kompreneble, ĝi estas en Newport, la plej ekskluziva somera rifuĝejo de niaj granduloj — mezurataj per la ora kriterio.

Mallonge post ĝia konstruado, Ges-roj Wanderbilt, laŭ kutimo inter la granduloj disiĝis. Ne estas necese aldoni, ke ŝia dua edzo, ido de la fama bankiera familio, estis la kaŭzo de ilia disiĝo. Dum la lastaj dekkvin jaroj la belega domo, plena de multaj raraj objektoj de arto, estis fermita. S-ro Belmont mortis antaŭ unu jaro. La malfermo de tiu ĉi luksega palaco post tia longa dormado estus interesa iaokaze; sed ĝia uzo por tia aristokrata celo — kaj en la centro de la pompa aristokrataro — ne povis ne altiri la atenton de nia gazetaro, kiu tiom ŝatas regali sian legantaron per sensacioj. La parolado estis sur la herbejo antaŭ la domo, por la allaso al kiu (la herbejo) la entuziasmuloj aŭ la amantoj de kuriozaĵoj estis devigataj pagi unu dolaron. Sed de tiuj, kiuj ankaŭ deziris ĝui la grandan privilegion eniri kaj rigardi la sanktejon de Amerika reĝaro, oni postulis kvin dolarojn. Nia saĝa mastrino, kiu scias kiel profunda estas la amo por « rememoraĵoj » en la koro (aŭ la poŝo) de certaj personoj, prizorgis necesajn antaŭrimedojn por gardi kontraŭ tiaj vandaloj, per la invito de granda nombro da policanoj kaj de tre lertraj detektivoj, kiuj zorge sekvis per siaj sfinksaj okuloj ĉiun suspektindan entuziasmulon. La enspezoj, kompreneble, estis donataj por la propagando de la afero.

J. Silbernik (New-York).

Barono Raab kaj la pensia demando en Svedujo

Antaŭ nelonge nin vizitis barono Raab, kies nelacigeblan oferemon kaj energian laboron devas ŝati ĉiu, kiu ne kontraŭstaras la homan progreson. La intereso de barono Raab al lia granda afero oni povas kalkuli preskaŭ de lia infaneco kaj li dum la lastaj 12 jaroj travojaĝis ĉiun parton de Svedujo kaj Skandinavio; li elspezis almenaŭ 50,000 $ el sia kaso kaj kolektis ĉirkaŭ 60,000 $, dum li predikis la simplan veron : ke ĉiu homo, ĉe sia naskiĝo, kaj poste, se li estas utila en sia vivo, havu la rajton, kiam venas maljuneco aŭ malsaneco, ne esti konsiderata kiel almozulo. Sian sistemon li nomas « sinmem-kaj ŝtata alhelpado ».

Liantaŭe verkis projekton, kiu tre klare montras la efektivigeblecon doni pension al maljunuloj, malsanuloj, orfoj, k. a., per kiu la elspezoj por zorgado al maljunuloj, post kelka tempo, mala perus. Antaŭ kelkaj jaroj li, per la sveda registaro, transdonis sian projekton al la angla tiama ministro Chamberlain kaj, kiel scias la legantoj, estas en Anglujo, de 1909, leĝo pri pensio al la maljunuloj, kiu estas laŭ la projekto Raab.

Por akceligi la aferon en Svedujo la komitato, kies prezidanto li estas, decidis starigi por ĝi en Stockholm kongreson de svedaj deputatoj; por tio barono Raab denove travojaĝas la landon parolante, vigligante, monkolektante. Lin oficiale invitis Danujo kaj Norvegujo kaj ankaŭ Francujo kaj Usono por fari paroladojn pri la pensia afero, sed antaŭ li deziras, ke la demando estu solvata en lia lando.

Jen mallonge lia leĝprojekto : La deputataro decidas pri funda, origina sumo, sur kiu la kalkulo estos bazita; supozu 400 Sm. ĉiujare. Nu, se pensiulo, atinginte 60 jarojn, tamen povas mem laborgajni 100 Sm., li ricevas el la pensia kaso la duonon de la diferenco inter la origina sumo (400) kaj la laborgajnata sumo (100). Tiamaniere lia jara enspezo estas 150 + 100 = 250 Sm. Laborgajnante mem

200 Sm. li recevas el la pensia kaso 50 Sm., te entute 350 Sm. jare, k. t. p., dis li mem laborgipso 600 Sm. Tiom li ricevas nenion el la kaso, sed gajnas malgrandigxon de la gxenerala taksoj. Cxi viro pagos al la kaso 5 Sm. jare kaj neeksingxinta virino 3,350Sm.;

la reston liveras la regna kaso. Por la pensio estas cxefkaso en la cxefurbo kaj filia kaso en cia pordeko.

Multaj ordonoj rekonpencis la laboron de barono Rauh kaj en Kristiania, oni interalie lin dankis jene: « Vi estas la unua inter la paculoj, car vi povas kred pacon en, la fundamento de homa socio, en la familio. La Nobelpremion vi plene meritas ».

C. Wisberg. *(Del Bergtofara).*

TRA LA MONDO

VALENCIO

Priskribi nun Valencion kaj ne paroli pri gia Ekspozicio estas preskaŭ neebla. Sekve mi laŭdelle promenigos la legantaron tra Valencio: unuatempe, kiam parte de la Ekspozicio.

Valencio, trie cxefurbo de Hispanujo, havas cirkaŭ 200.000 logantojn. Gi kuŝas sur vasta ebenajxo, le la bordoj de Turio, je 4 klk. de Mediterneo, kies kaveno unuigas



la monddama pentristo Ribera. Okcidente, staras la Urbodomo, konstruita en 1750, poste la plaso de la Regino, centro de la urba vivo, apude la preĝejo kun sia fama sonorituro Elirinte el la originala Pordego Placo ni trovas la Halon, kie oni havas esti uzata nur laŭ ars vidpunkto, car la modernaj vivo postulas gian laŭdindan malaperigon. Kontraŭ la preĝejo estas la

Johano vidiĝas la vendistarejo, eleganta gotika konstruajxo, kies konstruo finiĝis en 1498. La katedralo estas ankaŭ rimarkinda. En la Pordeĝo de la Apostoloro okazas tiujnokte kuriozo ceremonio, dum unika en la mondo, pri kiu mi aliam faĝos parolon. Angule de la katedralo staras la cxefturo de Valencio, la « Miguelete », kies pruflin cian taŭgas por karakterizi Valencion.

Xun, kelkajn vortoj pri la Ekspozicio. Gi kuŝas sur plataĵo de 180.000 kvadratmetroj. Tiuj post la eniro ni vidas la Palacon de Belartoj, kiu entenas kelkajn premitajxn majstrovorkojn, la Grandan Arenon, la Grandan Kojeron, beltforman konstruajxon tre admiratan, kaj la Festosalonon. Ni trovos poste la palacon de publikaj laboroj, de muziko, de bestkulturado, de aŭtomobilo, de l'industrio, k. a. En la palaco de Urbestraro, oni instalis Esperantan fakon, kiu certe movos Valencion al pli grandaj interesoj por nia afero, car ĝi estas tre vizitata. Estate la ekspozicio estas tre kompleta kaj havas multe da vidindajxoj.

Valencio havas nun duoblan aspekton, parte lokaan kaj komfortan kvazaŭ unuranga urbo, parte antikvan kun siaj respektindaj tradicioj. La gitana gazetaro konsistas el sep jurnaloj. Funkciadas kvar teatroj, multaj koncertejoj kaj unu Katedro. La karaktero de la Valencianoj estas laborema kaj gastema, sed precipe artema. En la vagonaro, kiu transportis min de Magdeburg kaj Leipzig proksimume 300 personoj, ĉiujparte nerespektataj, ĉeestis nian kunvenejn; en Hannover preskaŭ tiom da homoj plenigis la kunvenejon.

Oni rimarkis, ke la knabinoj ne komprenis sufice da Esperanto, ne fine parolis k. t. p., kaj ĝi ne plu estas tiom ofte vi cirkaŭataj de seivolemulaj, kiuj demandis pri ĉio eblaĵa. En la vagonaro mi estis en Magdeburg kaj Leipzig proksimume 300 personoj, ĉiujparte nerespektataj, ĉeestis nian kunvenejn; en Hannover preskaŭ tiom da homoj plenigis la kunvenejon.

Oni rimarkis, ke la knabinoj ne komprenis sufice da Esperanto, ne fine parolis k. t. p., kaj ĝi ne plu estas tiom ofte